**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 29

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** ␣ ␣ **st** ␣ **t** ␣ kolombeto ne flugas al buŝeto.

**2.** ␣ ␣ **str** ␣ en vojo – servantoj en ĝojo.

**3.** Kiu amas la liton, ne akiros ␣ **r** ␣ **f** ␣ **t** ␣ ␣.

**4.** Frumatene, kiam la skribisto kuŝis ankoraŭ en sia lito, frapetis je la pordo najbaro, kiu loĝis en la sama etaĝo, ␣ **t** ␣ **d** ␣ ␣ **t** ␣ de teologio, kiu eniris.

**5.** La eksterlandula ␣**v**␣ ␣ **t** ␣ **l** ␣ en Memfiso estis en la nord-orienta angulo de l' urbo proksime de Nilo.

**6.** La suspektindaj donacoj de grandkomercistoj, multekosta renovigo de la reĝa ␣ ␣ **l** ␣ **c** ␣ kaj diversaj malpli gravaj aferoj kaŭzis, ke multaj iĝis pli pozitivaj al respubliko.

**7.** Oni amase vizitis la ruslingvajn kaj "senlingvajn" (sportajn k.s.) aranĝojn, sed por io postulanta ␣ **n** **t** ␣ **l** ␣ **k** ␣ **t** ␣ ␣ kaj lingvoposedon kunvenis malpli ol po dek personoj.

**8.** Krom nemultaj salikoj, humile kliniĝantaj, kaj du-tri **b** ␣ **t** ␣ **l** ␣ ␣, neniu arbo vidiĝas ĉirkaŭ la vilaĝo.

**9.** Mi loĝas ĉe vi, al vi mi ␣ ␣ **nf** ␣ **d** ␣ ␣ mian propraĵon, kaj vi estas responda pri ĝi.

**10.** Laŭ esploro, kostas sep litrojn da akvo por produkti unu plastan akvobotelon, pli bone trinki akvon de la ␣ **r** ␣ **n** ␣ do, ĉie, kie eblas!

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Inter aliaj valoraĵoj estis ŝtelitaj ankaŭ **ĉ** ␣ **k** ␣ ␣, kiujn la ŝtelintoj monigis en turisma oficejo.

**2.** Sur la ĉielo ekbrilis la steloj, kaj la lokon de l' suno okupis nigra **d** ␣ **sk** ␣ ĉirkaŭita per ringo de flamoj.

**3.** "Ni eniru nun en la **b** ␣ **at** ␣ ␣!" diris la feino, "tie sur la ondanta akvo ni prenos iom da refreŝigaĵo."

**4.** Produktisto en **b** ␣ **z** ␣ **r** ␣ asertis, ke en lia produktejo oni uzas nur grenojn por nutri la kokinojn.

**5.** La komputila stilistiko kreas siajn h ␣ **ro** ␣ ␣ ␣, personojn kiuj dissolviĝas en la luda spaco, la tipo de la virtuala malbonulo estas la plej mendata.

**6.** En la verko estas pluraj tavoloj, abundas landokonaj faktoj geografiaj, geologiaj, historiaj k.a. tamen la eduka intenco sentiĝas, sed ne **k** ␣ **t** ␣ **n** ␣ ␣ la verkistinan fantazion.

**7.** Sur la tuta **k ␣ j ␣** troviĝis nur du lanternoj, kaj la virino ekiris meze inter ili – ŝia ombro dum la marŝado fantome pligrandiĝis.

**8.** Nur mankas miksi la viandon kun **s ␣ ŭ ␣ ␣** kaj kuiri dum almenaŭ unu horo, tiam la manĝo estas preta.

**9.** "Ŝargu! Celu! Pafu!" Li jam sentis la kuglojn profunde penetri en sian korpon, ŝirante histon kaj frakasante **r ␣ p ␣ ␣ ␣** survoje por agoniige trabori lian koron.

**10.** Kaheloj aŭ platoj kun reliefaj punktoj kaj **s ␣ ri␣ ␣**, kiuj troviĝas sur trotuaroj aŭ en fervojaj stacidomoj, helpas al vidhandikapuloj, indikante la vojon kaj atentigante pri danĝero.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| ŝmir', perfekt', duŝ', kot', golf', bibliotek', inteligent', juvel', klient', konferenc'. |
| --- |

**1.** La kosto de la studado, manĝado kaj loĝado en unulita, moderna ĉambro kun propra banejo kaj **␣ ␣ ŝ ␣ j ␣** por 4 monatoj estas ĉ. 1500 dolaroj.

**2.** Studinte la fakojn **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣** kaj komputistan, mi en 1992 fine cedis al mia lingva pasio, kaj ekstudis ĝeneralan lingvistikon en Kopenhago.

**3.** Apude troveblas **␣ ␣ l ␣ ␣ j ␣**, la restaŭrita fortikaĵo Raasepori de la 14a jarcento kaj aliaj vidindaĵoj.

**4.** Alfredas Jonušas laŭprofesie estas **␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣ t ␣**, li prilaboras sukcenon kaj feron kaj li jam organizis dek ses siajn juvelekspoziciojn.

**5.** Sub batanta pluvego kaj furioza ventego la homoj, unu post la alia, falsterniĝis sur la ŝlimon, ne nur malsekaj ili estis, sed jam tute **␣ n ␣ ␣ t ␣ g ␣ t ␣ ␣**.

**6.** Apenaŭ la fremdulo enfrotis al ŝi la **␣ m ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣** en la piedon, la maljunulino leviĝis kaj ekiris multe pli vigle ol antaŭe.

**7.** Post bongusta bankedo en apuda restoracio ĉiuj reiris al nia **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ c ␣ j ␣** por la distra vespero.

**8.** Atingi laborenspezon sufiĉan por la vivo povas nur tiu, kiu posedas altan **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ c ␣ ␣** en ia sciado, aŭ ian efektivan kaj energian talenton.

**9.** La tri filoj restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan **␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ r ␣ ␣**.

**10.** En Esperantio ĝenerale ne ekzistas plebo, kaj la ĉefa trajto de la verda popolo estas, ke ĝi plene konsistas el, almenaŭ potencialaj, **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣**.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La tertremo de 2015 kaj la neoficiala landlimo-blokado de Barato paralizis la ___ de la lando.

**a.** ekonomion **b.** aŭtobuson **c.** poeton **d.** violon

**2.** Jam ekzistis kaftrinkejoj, sed *Starbucks* popularas inter junulinoj pro sia ŝika interna ___ kaj – malsame al kutimaj kafejoj – malpermeso de fumado.

**a.** verso **b.** etaĝo **c.** martelo **d.** dekoracio

**3.** La maljunulo ĉiam donis al la infanoj ___, kiam ili renkontis lin surstrate, pro tio ili tre amis lin.

**a.** elektron **b.** bombonon **c.** pinon **d.** epokon

**4.** En flugaparatoj li muntadis ___ de rusaj motorboatoj kaj per tiuspeca transportilo li flugadis al la apuda vilaĝo viziti siajn gepatrojn.

**a.** putojn **b.** faskojn **c.** cigaredojn **d.** motorojn

**5.** Eble via Esperanto-organizaĵo deziros ĝemeliĝi kun iu Balkana Esperanto-societo aŭ fariĝi ĝia ___ kaj tiel helpi ĝian agadon kaj kreskon.

**a.** citrono **b.** ledo **c.** ventro **d.** patrono

**6.** La sesdekjara pasaĝero en ___ ĉemizo kaj ĝinzo rapide forlasis la buson.

**a.** placa **b.** freneza **c.** trikota **d.** ĉokolada

**7.** La novelaron *Ekstremoj* eblas trakti kiel specimenon de la bela perfekta ___ kun nelerte elektitaj temoj – por ekzemploj kaj ekzercoj.

**a.** akcidento **b.** stilo **c.** vermo **d.** vato

**8.** Tiu bela deklaro de Zamenhof trovas simpatian reeĥon en la koro de la skemistoj kaj kuraĝigas la lernantojn, lacajn de ___ absurdaĵoj de la naciaj lingvoj.

**a.** kapricaj **b.** ŝtonaj **c.** diligentaj **d.** profundaj

**9.** Se la varo estas donaco, ĝia pakumo ja postulas belecon, sed tia beleco devas esti ___, ĉar plej grava estas la kvalito de la varo mem.

**a.** ripoza **b.** modera **c.** angula **d.** ruĝa

**10.** Fariĝas komplika afero trovi ___ aŭ transportkompaniojn, kiuj volonte transportus eksportvarojn al Britio.

**a.** artikolojn **b.** makulojn **c.** brasikojn **d.** ŝoforojn